

SOCIALISTICKÁ SPOLEČNOST A MEZINÁRODNÍ JAZYK



Letos v prosinci uplyne padesát let od založení Sovětského svazu. Půlstoletí nás dělí od události, která měla zásadní význam nejen pro národy žijící na území bývalého carského Ruska, ale i pro lid celého světa. Nutno podtrhnout, že vytvoření SSSR demonstrovalo v praxi řešení národnostní otázky a národnostní politiky. Tento akt je třeba vidět v souvislosti s revolučním řešením sociální otázky, s vytvářením politického systému, který by zaručoval možnost vybudovat spravedlivý společenský řád.

Praxe při budování socialismu v Sovětském svazu ukázala, že po vítězství proletářské revoluce může být takovým politickým systémem jediné diktatura proletariátu. Rozvoj politického systému sovětské spo-

lečnosti je provázen dalším růstem autority dělnické třídy, která, jak konstatoval XXIV. sjezd KSSS, zaujímá vedoucí postavení v systému socialistických společenských vztahů. Vedoucí postavení dělnické třídy se upevňuje tím více, čím více roste i její všeobecná kultura a vzdělanost a rozvíjí se její politická aktivita.

Před pětapadesáti lety, v listopadu 1917, vyhlásila sovětská vláda Deklaraci práv národů Ruska: bylo nutno likvidovat ngramotnost, vytvořit abecedu pro desítky národů, bojovat proti feudálním a patriarchálním přežitkům. Velkou brzdou při realizaci tohoto programu byla hospodářská a kulturní nerovnost mezi jednotlivými národy. Negativně působil i velmocenský šovinismus projevující se u části ruského národa včetně některých komunistů, stejně jako nacionalismus rozmáhající se mezi příslušníky dříve utlačovaných národů. Proto XII. sjezd KSR (b) v roce 1923 vyzval všechny komunisty k boji proti velkoruskému šovinismu i místnímu nacionalismu.

Při řešení národnostní a jazykové otázky v Rusku po vítězství Říjnové revoluce nesehrál esperantismus žádnou podstatnou úlohu; svou negativní úlohu tu vykonal mj. neutralismus esperantského hnutí, jehož stoupenci si dostatečně neuvědomili, že jediné politickými prostředky lze prosazovat cokoli nového ve společnosti. Chyběla správná analýza prostředků pro konkrétní zavedení esperanta do mezinárodních styků, jež musí nutně vycházet z existence dvou hlavních a rozhodujících společenských tříd, buržoasie a proletariátu a jejich zájmů a cílů, přičemž je zřejmé, že v socialistické společnosti řešení jakéhokoliv problému musí být v zájmu dělnické třídy.

Již události po vypuknutí první světové války daly za pravdu V. I. Leninovi, když se ukázalo, že imperialistické mocnosti propadly šovinismu vedoucích národů,
/dokončení na str. 5/

PORPACA RENKONTIĜO EN MĚLNÍK

VENIS PUPTĚATRISTOJ EL KOŠICE • ALTA REKONO AL LA LOKA EK

Malgraŭ frostigaj vento kaj pluvo, kiuj tiudimanche furiozis en Mělník, la atmosfero en la tiesaj kastelo kaj pli poste en la Kulturdomo de kpt. Jaroš estis kromordinare varma kaj amikeca. Vere internacia estis etoso ĉe la tradicia jam 6-a internacia renkontiĝo en la fama vin-urbo, kie amasiĝis la 21.-22an de oktobro pli ol 150 esperantistoj el ĈSSR kaj sesdeko da eksterlandaj gastoj el Germana Demokratia Respubliko, Pollando, Hungario, Jugoslavio, Aŭstrio (speciala aŭtobuso) - kaj eĉ el Japanio! El Prago alveturis aŭtobuso kun ĉ.30 vizitantoj.

Ekstertradicia estis la posttagmeza dimanĉa programo. En la Kulturdomo ĉiuj spektis prezentadon de la Ŝtata Pupteatro el Košice, venkinto de la Esperantaj pupteatraj festivaloj en Zagrebo. Kune kun la geaktoroj oni travivadis kortuŝan historion de la migranta pariza pupisto Jean kaj lia knabo-pupo Guignol (legu Ginol/, kiuj kontraŭ persekutoj kaj maljusteco de riĉuloj imagigas bildon de alia, pli bona sociordo. La surscenigon "Aventuroj de Guignol" en la E- traduko de E.V.Tvarožek enkondukis ing.M.Zvara, akompananto de la trupo.

Pro siaj arto kaj perfekta lingvo la geaktoroj rikoltis abundan eĥon inter la diversnacia spektantaro. Certe ankaŭ pro tio, ke ili devis oferedoni multajn horojn veturante pervagonare al Mělník kaj jam post la prezentado reveni al sia hejma scenejo.


Dum la paŭzo la prezidanto de la loka ER ĉe ZDŠ Jungmannovy sady s-ro Josef Vitek transprenis honortitolon "Pacdefenda Esperanto-Grupo, kiun atribuis al tiu ĉi sukcesa E-rondeto - por la unua fojo en Ĉeĥoslovakio - en la nomo de la Distrikta Pakkonsilantaro ĝia prezidantino k-dino Bouzová. Parolis ĉe la ceremonio laureato de la Ĉs.pacpremio s-ano T.Balda, la reprezentanto de CK ĈEA ark.J.Drlik kaj delegitoj de la eksterlandaj karavanoj.

Oficiala honorigo al la Esp-Grupo en Mělník estas alta rekono por ties viglega kaj modela porpaca laboro precipe en la lastatempa kampanjo de la ĉs.esperantistoj helpe al la vjetnamaj amikoj. Ĝi estas rekono por la tuta ĉs.movado. O.Kníchal



S-ro J.Vitek transprenas la honortitolon de k-dino Bouzová.
(fotis K.Lojska)

DŮLEŽITÉ UPOZORNĚNÍ ! Vzhledem k zavedení poštovních směrových čísel je nutné uvádět tato čísla na všech zásilkách. Našemu svazu bylo přiděleno č.120 21. Veškerou korespondenci proto zasílejte výhradně na adresu : Český esperantský svaz, pošt. schr. 8 120 21 P r a h a 2. Děkujeme.



Forpasis Tomáš Pumpr

Post mallonga suferiga malsano forpasis la 10an de septembro 1972, aĝa 66 jarojn, JUDr. Tomáš P u m p r, honora membro de ĈEA, membro de Akademio de Esperanto, eminenta esperantologo, bonkora kaj helpema homo kaj amiko. La forpasinton venis adiaŭi 14.9. multaj esperantistoj, i.a. membroj de CK ĈEA. Ĉe la funebra ceremonio parolis la prezidanto de ĈEA Josef Vitek, J.Kořínek kaj E.Urbanová.

Kondolencan leteron al la ĉefaj esperantistoj sendis la prezidanto de UEA d-ro Ivo Lapenna. Li skribas interalie: "Por sia grandioza verko D-ro Pumpr plu vivos en la Esperanto-Movado kaj lia nomo ĉiam estos alte respektata kaj honorata".

Nekrologon pri d-ro T.Pumpr ni aperigas sube.

Adiaŭ, Amiko

(al D-ro Tomáš Pumpr)

Venas sciigo fulmobata :
el la amikoj pasis for
homo unika kaj ŝatata,
haltis plej nobla homa kor'!

Por famili' esperantista
perdo kruela por estont',
ĝi trafas ĉiujn kaj en trista
aflikto dronas verda rond'.

Majstro el vico de l'elito
kaj mondformata korife',
dormu en mola tera lito
dum ploras nia plenda ve'.

Sed monumento de laboro,
verko senmorta de poet'
vivos eterne en memoro,
torĉ' por l'estontaj kaj hered'.

Adiaŭ do, amiko kara,
adiaŭ do por lasta foj',
vi homa gemo la plej rara
trovita sur la vivo-voj'.

Jiří K o ř í n e k

11.9.1972

ELSTARA FAKULO KAJ ŜATATA HOMO

D-ro Tomáš PUMPR naskiĝis la 2an de oktobro 1906 en Dolní Slovénice apud Třebon/Suda Bohemio/. Post siaj universitataj studoj li fariĝis juristo kaj ŝtata oficisto; en la lastaj jaroj li estis aktiva en ŝtata entrepreno en Praha.

Kun Esperanto li konatiĝis en 1926. Sur la literatura kampo Esperanta li debutis per prozaj kaj versaj tradukoj por "Ĉeĥoslovaka Antologio"/1935/. Libroforme aperis liaj tradukoj "Bukedo el ĉefaj naciaj mitoj" de K.J.Erben/1938/ kaj "La Bapto de Caro Vladimír" de K.H.Borovský /La Stafeto 1953, reeldono en Praha 1967/. El la fama ĉeĥa poemo "Majo" de K.H.Mácha li publikigis en E-o kelkajn fragmentojn presforme.

En la jaroj 1946-48 d-ro Pumpr estis kunlaboranto de Esperantaj artprogramoj de radiostacio Praha /Verda Stacio/. Por la radioelsendo li tradukis kaj kun muzika kunlaboro de d-ro J. Fousek adaptis E-tekstojn de la operoj "Vendita Fianĉino" /Sabina-Smetana/, "En la puto" /Sabina-Blodek/ kaj "Najado" /Kvapil-Dvořák/. Krome li tradukis pliajn oper-ariojn, artajn kaj popolajn kantojn.

Kunlabore kun R.Hromada kaj J.Kořínek li tradukis kaj en 1970 publikigis la

poemaron de P. Bezruč "Sileziaj kantoj". Liaj tradukoj el poezio de O. Březina samkiel pluraj tradukitaj poeziaĵoj de la ĉeĥaj poetoj restas ĝis nun en manuskripto kaj parto de ili deponata en la Březina-Muzeo en Jaroměřice.

Tre meritplenan ĉapitron en la traduka laboro de d-ro Pumpr prezentas lia uzo de Esperanto kiel pontlingvo por popularigo de la ĉeĥa literaturo en eksterlando. Fruktodonaj estis liaj kontaktoj kun Ekstrema Oriento. Laŭ lia Esp. traduko la ĉina poeto Li Laojon eldonis en 1960 ĉinlingve la poemlibron de S. Čech "Písň otroka" /Kantoj de sklavo/. Prespretaj ĉinaj tradukoj de la kompleta poemaro "Sileziaj kantoj" de P. Bezruč kaj "Bukedo" de K. J. Erben - ambaŭ sammaniere preparitaj pere de Esperanto - jam ne povis aperi pro politikaj eventoj en Ĉinio.

Kiel pontlingvo servis Esperanto al d-ro Pumpr ĉe la tradukado de teatraĵo "La Mondo ne havas Atendejon" de la nederlanda verkisto M. Dekker en la lingvon ĉeĥan. La verko, adaptita por radioelsendo, estis kun bona reeĥo elsendita de la ĉs. radiostacioj Ostrava kaj Praha.

D-ro Pumpr en siaj tradukoj sukcesis redoni ne nur fidelan enhavon de koncerna originala verko, sed ankaŭ mirinde fidele transkomponi en sian tradukon la internan atmosferon, dinamikon kaj poezion de la originalo. Majstre li venkis ŝajne nevenkeblajn specialaĵojn de la nacia lingvo kaj prezentis al la legantaro tradukojn freŝajn, sukajn kaj tamen surprize simplajn. Tiu ĉi fakto estis konsekvenco de lia profunda kaj intima kono de Esperanto. Tiurilate estis d-ro Pumpr la plej aŭtoritata lingva kompetentulo en Ĉeĥoslovakio kaj pro sia prilingva klereco estis en 1962 elektita kiel membro de Akademio de Esperanto.

En pluraj fakaj studoj li science traktis problemojn de la Esperanta gramatiko /ekz. 106-paĝa traktato "Esperanto sen Aspektoj?" en la libro "Simpozio pri -ata/-ita", La Stafeto 1961 k.a. / Siajn kontribuojn gramatikajn, poetikajn kaj literaturajn li publikigis en diversaj E-revuo, ekz en La Nica Literatura Revuo, Literatura Mondo, Norda Prismo, Esperantista, Starto k.a.

Grava estis kontribuo de d-ro Pumpr al aperigo de "Poŝatlaso de la Mondo" en Esperanto /1971/. Li tradukis la tekstojn kaj zorgis pri la lingvo ĝenerale.

En la organiza vivo laboris d-ro Pumpr kiel gvidanto de literatura komisiono ĉe EACS SR kaj longajn jarojn li estis sekretario de la Ekzamena Komisiono. En la "Tutŝtata Konsulta Komitato Esperantista" li estis membro de la lingva fakto. Dum aperado de "La Nica Literatura Revuo" li apartenis al ĝia redakta sesopo. Por la ĉs. eldono de PACO li tradukis en E-on multegajn artikolojn kaj zorgis pri ties alta lingva nivelo.

En d-ro Pumpr foriras el la enlanda kaj tutmonda Esperanto-movado ne nur unuaranga prilingva fakulo, sed ankaŭ estimata kaj ŝatata homo, kies personecon karakterizas modesteco, ekstrema laboremo ne atendanta rekompencan aŭ glorigon; komprenemo por fremdaj problemoj kaj persona grandanimeco en viv-batoj, kiuj renkontis lin. Tiuj, kiuj havis okazon persone kontakti d-ron Pumpr, konservis daŭre en siaj koroj la plej helan rememoron pri li.

D-ro V. Novobilský

III-a BIENALO DE FANTAZIO. En Martin, Slovakio, denove okazos kun helpo de esperantistoj la internacia konkurso de infana kreado je la temoj: rakontoj, kantoj, proverboj. La aranĝanto estas Popola Lernejo de Arto, Martin. Limdato por alsendo de la konkursaĵoj: 30a de marto 1973.

/dokončení z 1.strany/

Na platformu nacionálního šovinismu přešly - kromě ruské - všechny sociálně demokratické strany.

Buržoazie zároveň utlačovala malé národy, jež byly součástí jejich říší. Proto Lenin dospěl k závěru, že národně osvobodenecké hnutí je namířeno proti im- ti nadvládě kapitálu. Proletářská strana musí tedy umět využít tohoto hnutí a usměrnit je tak, aby sloužilo zájmům socialistické revoluce. Pro Lenina bylo základním kritériem, zda národní hnutí napomáhá uplatňování demokracie a svo- body, zda vytváří podmínky pro mezinárodní spolupráci proletariátu.

Ve svých pracích o národnostní otázce se Lenin znovu a znovu vrací k my- šlenke o nezbytnosti dlouhodobé výchovy dělníků v duchu národnostní rovnosti a bratrství. Připomíná například, že právě v zájmu velkoruského proletariátu je zapotřebí vést masy do boje za prosazení úplné rovnoprávnosti a práva na sebeurčení pro všechny národy ujařmované Velkorusy.

Lenin projevil velkou důvěru v praktický smysl pracujících mas, když vyjá- dřil názor, že dělníci si velmi dobře uvědomují význam hospodářských a země- pisných svazků, velkého trhu a velkého státu. Proto předpokládal, že k rozpa- du velkých států by mohlo dojít teprve tehdy, až národnostní útlak a národ- nostní rozpory učiní soužití národů na jejich území zcela nesnesitelnými.

Tato myšlenka zasluhuje zvláštní pozornost, neboť se týká nejen poměrů v teh- dejším sovětském Rusku, nýbrž v obecné míře i vzájemného soužití všech národů budujících socialismus. Právě dnes, na prahu nové éry socialistické integrace vystupují do popředí více než kdy předtím hospodářské a politické motivy in- tegračního procesu, jenž ve svých důsledcích povede ke sbližování národů.

V tomto směru by se mělo prakticky angažovat také hnutí stoupců mezinárod- ního jazyka esperanta. J.Drlik

La helpo al Vjetnamio daŭras

La estraro de la ĉeĥa MEM-sek- io decidis kunkrei oportunajn kondiĉojn-precipe materiajn-ki- uj ebligis al niaj bravaj vjetnamaj pacamikoj el VPEA partopreni en la venontjaraj Generala Konferenco de MEM /en 1973 solenos ĉi tiu monda organizaĝo sian 20jaran ekziston/ kaj en la 58-a UK de Esperanto, kiuj okazos en Beogrado.

La sekcio jam kolektis por tiu celo provizore 3 000 vĉs dum la okazinta kampanjo "Ĉs.esperantistoj al la batalanta Vjetnamio".

La estraro de la MEM-sekcio en ĈSSR amike alvokas ankaŭ ali- landajn sekciojn,perantojn kaj aktivulojn de MEM organizi simil- ajn kampanjojn por certigi la vojaĝon la VPEA-delegitaro al la menciitaj eventoj.



EK-anoj el Mělník,ZDŠ Jung- manovy sady vizitante last- somere la polan havenurbon Gdynia.

Ankoraŭ unufoje SET

En Starto kaj Bulteno aperis artikolo pri la jubilea 20-a SET en Lančov, en kiun enŝteliĝis neĝusta informo, kiu mirigis precipe la organizintojn de la 1-a SET okazinta apud Chvalatice ĉe la valbaraĵo de Vranov. Tie ni legis: "...ĝian originon metis antaŭ 20 jaroj la organizantoj de la 1-a SET en Žimrovice /Silezio/...

Probable temas pri miskompreno, ĉar la 1-a SET Chvalatice okazis en julio 1952, la SET Žimrovice okazis unu monaton pli poste, do en aŭgusto 1952. La organizantoj de la 1-a SET Chvalatice estis s-anoj P.Sittauer kaj J.Habeš, kiuj ĝin planis kaj organizis, uzante siajn proprajn kelkjarajn riĉajn spertojn en tendumado kun junularo. Tie en Chvalatice ili metis la semon en fekundan grundon; tie do estas la origino kaj komenco de la impona vico de dudek SEToj. Kiel ĉio sana kaj vivikapbla ankaŭ la SEToj organizitaj de la E.K. Třebíč evoluis laŭ natura maniero kaj sen ekstera influo: la unuan modestan SET Chvalatice partoprenis geknaboj el Třebíč, la sekvantaj allogis iom post iom ankaŭ gejunulojn kaj fine ankaŭ maturulojn el ĉiuj anguloj denia patrujo, ja eĉ de Eŭropo. La famon de SET Lančov disvastigas nun pli ol 3 000 setanoj ne nur en nia respubliko, sed ankaŭ en preskaŭ ĉiuj landoj de nia kontinento.

En la jubilea SETano n-ro 1/6 aperis artikolo Iom da Historio, en kiu ni legis: "En du kluboj samtempe naskiĝis ideo organizi someran tendaron..." Tio estas ĝusta kaj justa konstato. Ambaŭ tendaroj, en Chvalatice, kiun partoprenis 36 gejunuloj de la Esperanto-Junularo Třebíč, kaj Žimrovice, kun 27 gejunuloj el Opava kaj kelkaj aliaj lokoj, estis memstaraj kaj sendependaj. SET Chvalatice estis do origina, ĉar kopiaĵo ne antaŭiras la originalon. Estas domaĝe, ke la Opavanoj ĉesis post la 5-a tendaro sian aktivecon. Ĉar dividita laboro - duona laboro.

Th. Kilian

Junulara seminario en Rejdice

Inter la 22-24a de septembro okazis en Rejdice apud Tanvald (norda Bohemio) jam la 3-a porjunulara seminario, kiun partoprenis la geknaboj el la distriktoj Liberec, Jablonec n.N., Litoměřice, Jičín, Mělník kaj Semily. La aranĝanto estis EK en Liberec (J.Špína) kaj JS ĈEA.

Pri la aktualaj problemoj de la ĉeĥa esp. junularo kaj la lastatempaj junularaj E-eventoj oni diskutis la 23an de sept. kun la reprezentantoj de JS ĈEA Jindra Řeháková, Jiří Bohun kaj Václav Vítek. Pri traktita estis ekz. la lasta kongreso de TEJO en Toruń, Hungara Kultur-Festivalo kaj ne lastvice ankaŭ la junulara etapo de SET Lančov 1972.

La junaj homoj konatiĝis poste kun la laboro de ĈEA kaj ties junulara sekcio: digna reprezentado de nia socialisma patrujo, kunlaboro kun la junularaj organizaĵoj en- kaj eksterlande, ĉefe en la socialismaj landoj, plialtigo de lingvonivelo ks.

La 24an de sept. reprezentanto de la Distrikta Komitato de Socialisma Junulara Ligo (OV SSM) parolis pri la gravaj taskoj de la junaj esperantistoj - kaj pri la socialisma internaciismo.

En la kultura kaj distra programoj prezentis sin ĉefe la muzika trupo "Folk Melody Quartet" kaj s-ro A.Slanina el EK Praha. (k)

Konfuziĝo kun majuskloj

Estis tre bone, ke s-ro Mařík konstatis (vd. rec. pri PIV, Starto n-ro 6) kelkajn mankojn de cetere grandega laboro de G. Waringhien kaj ke li atentigis pri la komencliteroj de la naciaj nomoj, kiuj en PIV estas skribataj majuskle.

Trastudado de la Zamenhofaj verkoj konvinkos nin, ke ankaŭ la aŭtoro de E-o ne traktis tiun problemon konsekvence, skribante ĉiam majusklojn: Tataroj, Armenoj (Originala Verkaro, pg. 370), aliffoje minusklojn: rusoj, poloj (OV, 322). Krome PIV uzas majusklojn ankaŭ por derivaĵoj de propraj nomoj: Esperanto-Esperantisto (Zamenhof: esperantistoj, OV, pg. 310, 314), Kristo - Kristanoj (Zm: kristano OV, 330). Waringhien superflue enportas haŭson per du radikoj por: Mahometo-Mahometano kaj Mohamedo - Mohamedano! (Zm: mohametano, OV 330).

En Ekzercaro §34 ni legas: Hispano, Germano, §36 Izraelido; en §12 eĉ Aprilo, Januaro ktp. En Fundamenta Krestomatio Z. daŭrigas en tiu ĉi sia kutimo kaj skribas Amerika, Amerikano, sed denove ankaŭ: amerikaj saĝoj... (FK, 219) ktp.

El tiu nekonskvenca uzado de majusklo kaj minusklo rezultas, laŭ mia opinio, ke ni povas tute trankvile skribi minusklojn, de: aprilo, germano, esperantisto, kristano, mohametano, amerikano, husano ktp., ĉar jam la nuna praktika uzado tiun ĉi formon sankciigas kaj eĉ Waringhien skribas: pg. XXXII 5^o Majuskligo ad 2: Pro presa oportuneo kaj ankaŭ ĉar tia ŝajne estis la kutimo de Zamenhof en liaj (erare: siaj) lastaj verkoj, la popolnomoj estas markitaj per komenco majusklo. 3) La uzado de komenco majusklo de la derivaĵoj de la propraj nomoj ankoraŭ ne estas firme decidita...

Do, nenia dogmo (nur persona, neprincipa kutimo!) kaj ni certe ne tro pekos, se ni "racie kaj moderne" skribos ĉiam minusklojn kaj nur ĉe la propraj nomoj majusklojn! Kvankam eĉ en Filipino ni legas: Esperanto, Esperantistoj!

V. Pechoĉ



SIGNALILO
FERVOJISTA
SEKCIO
DE ĈEA

ER "Amikeco" en Ĉ. Třebová, kies preskaŭ ĉiuj anoj estas fervojistoj, malfermis post la someraj ferioj de Esperanto-kursojn: por komencantoj kaj progresintoj.

Gajan Silvestran vesperon aranĝos ER la 28.12.1972 en malgranda salono de Uzina Fervojista Klubo. Programo: muziko, kantoj,

danco kaj bona vino. Ĉiuj kore invitataj!

Popularan kaj ŝatatan Esperanto-balon - jam la kvaran - kun internacia partopreno oni realigos en granda salono de UFK la 3an de februaro 1973. Jam nun estas invitataj geamikoj el ĉiuj urboj. Detalajn informojn petu ĉe s-ro J. Pištora, Nám. míru 1746, Ĉ. Třebová,

Amikecaj kontaktoj de nia klubo kun tiu en Klodsko/Pollando/ bone prosperas. Oni preparas komunan renkontiĝon printempe en Ĉ. Třebová.

EL EKSTERLANDO. Provajn trajnveturojn, ĉe kiuj lokomotivo estas ekipita per du turbinmotoroj, estis aranĝitaj de la francaj fervojoj. Post kompletigo de tiuj ĉi provoj la lokomotivo, kiu devas veturi per 200kilometra rapideco pohore, estis prezentita al vasta publiko okaze de la Internacia fervoja ekspozicio en Parizo.

STARTO - eldonas ĈEA, p.k. 8 120 21. Aperas okfoje jare. Resp. redaktoro O. Kniĉal. Red. komitato: ing. E. Felix, J. Mařík, ing. F. Sviták. Abonebla sole por la asociaj membroj. - Dohlédací pošta Praha 07, sniž. pošt. poplatek pov. RP Praha j.zn. P/1-2283/1971, dne 6.5.1971. Toto číslo předáno do tiskárny 31.10

Rondeta vivo

OSTRAVA (PORUBA) - ER ĉe Kulturdomo de OKD kunvenadas nun ĉiulunde (anst. marde) je la 19a horo. Enkadre de diverslingvaj "konversaciaj vesperoj" okazas tiaj ĉiumonate ankaŭ en Esperanto kun interesa programo. La datoj kaj programoj estas ĉiam anoncataj sur afiŝoj en Kulturdomo de OKD, en la monata magazeno "Ostravský kulturní zpravodaj" kaj aliloke.

Esperanton popularigas granda monstrofenestro apud la kinejo Dukla, por kiu taŭgan materialon liveras s-ro Taraba. Pri la rondeta biblioteko modele zorgas s-ino Mikolajková. (AST)

OSTRAVA VŽKG - Fine de septembro estis malfermita E-kurso en la urba Pionira Domo en Ostrava-Mariánské hory.

S-ro J. Hinčica, EK-membro, ricevis legitimilon de ĈEA n-ro 3 000. - Kurson por komencantoj aranĝas la rondeto de la 27a de sept. - Oni preparas ekskurson al Žilina por rigardi tie televidan kurson de E-o en la slovaka televido.

En Ostrava mortis la 22an de sept. en la aĝo de 42 jaroj Ladislav Adámek, konata kunorganizanto de SET Lančov.

Honoron al lia memoro!

PASKOV - Unuan solenan koncerton en la internacia lingvo Esperanto okazigis la klubo la 14an de okt. en Žabeno, en la nova kulturdomo. La artan programon prezentis la vira kantoro "Smetana" el Frýdek Místek sub la gvido de František Klus. La entrepreno estas siaspece unika en la Esperanto-movado.

PÍSEK - EK "La ponto" jam la trian fojon organizis ĉi somere komunan ri-

Al la geedzoj Sylva kaj Pavel Polnický naskiĝis 23.9.1972 la filineto Alic e. Sinceran gratulon al la juna paro!

Preseraro enŝteliĝis lastnumere en la naskiĝdaton de prof. Lukáš (anst. taŭ 5.9. devis esti 15.9.) Ni pardonpetas la jubileanton kaj la legantojn.

pozon por siaj membroj kaj por gastoj el eksterlando en la kabano de la ŝtata entrepreno Jitex en Churáňov. Pro malfavora vetero la turisma programo devis esti reduktita.

La klubo malfermis konversaciajn lecionojn por progresintoj.

PRAHA - Rememor-vesperon pri Dro T. Pumpr okaze de lia neĝisviva 66-a naskiĝtago aranĝis 3.10. la EKP. Siajn rememorojn eldiris A. Bartošík, R. Horský, E. Felix, J. Kavka, V. Novobilský, E. Urbanová, J. Mařík, deklamis J. Kořínek. Kantis L. Smyčka, membro de Ŝtata Opero Ustí n. L., pianludis kaj la erojn parolligis d-ro Novobilský. La rememoroj montris la profundan kaj ĉiuflankan karakteron de T. Pumpr, sed ankaŭ lian esencan emon al sprito kaj bonhumoro.

Ĉeestis la vidvino, s-ino B. Pumprová.

VSETÍN - Ankaŭ ĉijare ER ĉe Laborista Klubo aranĝas diversajn formojn de la lingvoklerigo (fundamentan kurson, porkomencantan kaj programkunvenojn dumjare). Ili startis la 9an de okt. La frekventintoj esperas jam venontjare havi okazon praktike elprovi siajn konojn de la Internacia Lingvo ĉe la UK de UEA kaj dum la Somera Universitato en Szeged.

ZNOJMO - Bone konatigis la E-ideon al la loĝantaro de Znojmo mezlerneja Esp. rondeto ĉe la agrikultura lernejo kaj EK ĉe la Kleriga societo, kiuj okazigis ekspozicion de floroj kaj bk. sub la devizo "Per Esperanto por la mondopaco". La ekspozicion vizitis 800 personoj.

FERIOJ EN HUNGARIO. Internacian pioniran tendaron por esperantistaj infanoj en Sikonda apud Pécs partoprenis ĉijare - krom la polaj kaj hungaraj gejunuloj - ankaŭ 16 junpioniroj el Ostrava. Kune kun la hungaraj pioniroj ni festis la 26an datrevenon de ilia organizaĵo. Tiam vizitis la restadejon ankaŭ partoprenantoj de IREN (Internacia Renkontiĝo de Esperantistoj Naturamikoj), por kiuj oni preparis riĉan programon. Ni vizitis ankaŭ la urbon Pécs kaj interesan stalaktitan groton en Abaliget.

K. Fremlová, Havířov